Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 17 – 24 julio

# La Kolombo de Paco

**17-a de junio 2021, numero 2**

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Societo Zamenhof kunvenos

Duncan Charters,
la Prezidanto de UEA

Kelkdeko da membroj de Societo Zamenhof kunvenos virtuale ĉi-semajnfine, la 19-an de junio, por ricevi ĝisdatigojn pri progresoj en UEA. Ĝin organizas la ĉefa iniciatinto, Humphrey Tonkin, Honora Prezidanto de UEA, kun la celo kuraĝigi mecenatojn subteni specialajn laborkampojn de UEA kaj specifajn projektojn kiuj helpas antaŭenigi la efikecon de la laboro de UEA en monda kadro. La membroj havos la okazon fari demandojn al la Prezidanto, estraranoj kaj aliaj respondeculoj de la Asocio kaj de TEJO post prezento de ĝisdatigaj raportoj. La gvidantoj intencas ke komunikado okazu regule en tiaj kunsidoj dum la jaro, kaj ne nur dum la Kongresoj, kaj invitas ĉiujn subteni la Asocion per aktiva membreco kaj donacado por antaŭenigi ĝian laboron, kaj akcepti rekonon kaj dankon pro iliaj esencaj financaj kaj aliaj kontribuoj.



**Societo Zamenhof**

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA!

Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA kaj inviton al akcepto en la Universala Kongreso. La kotizon (duoblo de MA por via lando)vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.

Pliaj informoj ĉe *https://uea.org/alighoj*

## IJK 2021 en la reto – 77-a Internacia Junulara Kongreso

La Internacia Junulara Kongreso de Esperanto, IJK, okazas ĉiujare ie en la mondo. En 2021 ĝi devintus okazi en la ĉefurbo de Ukrainio. Anstataŭe ni proponas al vi **retan eventon inter la 30-a de julio kaj la 8-a de aŭgusto!**




La estraro de TEJO decidis ne gastigi ĉeestan IJK en 2021. La ebleco ke iu infektiĝu pro la partopreno estos tro alta. Ni movis la kongreson al reta formato, por eviti tiun riskon, kaj por ke ni tamen povu kune amuziĝi kaj ĝui la etoson de IJK de ĉie ajn, kie en la mondo vi estas.

Atendas vin (novaj) amikoj, koncertoj, diskutrondoj, kvizoj, prelegoj kaj pli!

La aliĝo estas **senpaga** por Individuaj Membroj kaj Patronoj de TEJO.

Pli da informoj pri kotizoj kaj pri kiel vi povas aliĝi estas ĉi tie:
https://ijk2021.tejo.org.

Vi povas esti aŭtoro de la *Kolombo de Paco* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio *redakcio@revuoesperanto.org*

# Ek al la 8-a Afrika Kongreso!

Adjévi Adjé

Senegala Esperanto-Asocio estas la loka kunorganizanto kaj gastigonto de la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE), okazonta sub la temo: «Esperanto, ŝanco kaj ne minaco por Afriko» de la 26-a ĝis la 30-a de decembro 2022 en la urbo Tieso.

Tieso staras 70 km okcidente de la ĉefurbo Dakaro kaj ĉ. 38 km de la internacia flughaveno. Ĝi estas unu el la 14 administraj regionoj de Senegalo kun 765 213 loĝantoj en 2019. En la urbo ekzistas ĉiuj servoj, kiujn oni povas trovi en ĉiu granda urbo, nome bankoj, ATM-aŭtomatoj, hoteloj ktp.

La membroj de la loka organiza teamo regule kunvenas pri diversaj aspektoj de la pretiglaboroj, interkonsiliĝe kun la Afrika Komisiono. Krom interkonsento pri la kongresaj periodo, temo kaj emblemo, esplorvizitoj al pluraj lokoj kaj laste elekto de Tostan-lertigejo kiel la sidejo de la kongreso, okazis decidoj pri la ekskursoj dumkongresaj: 2 duontagaj ekskursoj (unu al la roza lago kaj alia al Dakaro) kaj 1 tuttaga ekskurso al Goreo, monda heredaĵo de Unesko. Alia atingeto estas interparolo de lokanoj lastmaje kun ĵurnalisto de la ŝtataj televido kaj radio pri Esperanto kaj rilataj aktivaĵoj enlande.

La evoluigo de la afrika movado dependas unuavice de ni afrikanoj, sed ankaŭ de ĉiuj bonkoraj kaj helpemaj esperantistoj. AKE estas kutima aranĝo, dum kiu esprimiĝas en palpebla maniero parto de la tutmonda Esperanto-bunteco en afrika etoso per partopreno surloke de enkontinentaj kaj alikontinentaj esperantistoj tra kunsidoj, lernadoj, amuziĝoj, ludoj…

La sekvjara evento estos prezentata dum la 2-a VK per lumbildoj. La Afrika Komisiono kaj SEA invitas esperantistojn multnombre partopreni la prezentadon kaj ankaŭ antaŭdankas pro ĉiu subteno al la aranĝo per mondonaco al la konto Afriko ĉe UEA kun indiko «AKE-8» aŭ per plua diskonigo de tiu ĉi anonco. Ĉiuj informopetoj al *ake-8-organizantoj@googlegroups.com* estos responditaj.

# Pri la 54-a ILEI-Kongreso en 2021 7 – 14 aŭgusto 2021

Mireille Grosjean

Ni devas rezigni pri la surloka fizika kunveno en Benino. La anoncoj pri aliĝoj estis tre malmultaj pro la daŭraj limigoj kaj obstakloj en vojaĝado. Tamen la pandemia situacio en Benino daŭre estas tute kontentiga kaj sekura.

ILEI lanĉas Virtualan Kongreson, VEKI 2.

Okaze de tiu evento Benino restos en nia fokuso, ĉefe en la Nacia Vespero.

La kongresa temo estas kaj restas: “**Esperanto-kulturo en Esperanto-kursoj**”

La komitatkunsidoj okazos dimanĉe la 8-an kaj marde la 10-an de aŭgusto.

Dutaga simpozio okazos ĵaŭde la 12-an kaj vendrede la 13-an de aŭgusto.

La temposkemo en tri sesioj en ĉiu tago restos la sama kiel en 2020 en VEKI 1.

La teknika organizado estas en la manoj de Unika.

La programa starigo estas en la manoj de Marija Belošević kaj Mireille Grosjean.

La simpozia koncepto estas en la manoj de Ivan Colling kaj Radojica Petrović.

La aliĝilo estas en preparo.

La Kongreskotizoj estos: por A-landanoj: 20 EUR. Por B-landanoj: 10 EUR. Por subvenciataj personoj (ni alvokas A- kaj B-landanojn, ke ili subvenciu unu aŭ plurajn personojn, kiuj ne povas facile transpagi ian sumon al Eŭropo): 5 EUR. La pagoj povos okazi per ĝirado el UEA-konto de partoprenonto al la UEA-konto de ILEI aŭ per ĝirado per kreditkarto al indikota banko en Belgio.

Por demandoj kaj proponoj pri pagado kaj subvenciado turnu vin al *mirejo.mireille@gmail.com*.

Ni forte esperas, ke ĉi-tiu 54-a Kongreso estos fruktodona, lertiga, interesa kaj distra.

# Pri la RETOSO ĉe *ESF Connected*

RETOSO estas la aranĝo de TEJO, kiu okazis inter la 2-a kaj la 5-a de aprilo 2021. Ĝi okazis rete kaj estis tutmonda evento, kun organiza teamo el 7 landoj en 4 kontinentoj, kaj partoprenebla por homoj ie ajn en la mondo. Ĝi havis programerojn en tempoj taŭgaj por homoj en Azio, Ameriko, Afriko, Oceanio kaj Eŭropo.




Krom la aliaj programeroj dum RETOSO okazis la Internacia Reta Interfaka Simpozio (IRIS), kiu enhavis podiajn diskutojn pri diversaj fakoj, ekzemple, psikologio, inĝenierarto kaj antropologio.




Membroj de TEJO povis partopreni ĝin senpage.

Tyron Surmon verkis blogaĵon pri la aranĝo por *ESF Connected:*
https://esfconnected.org/2021/06/07/retoso/




**La danĝera lingvo**. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto. Ulrich Lins.
Nova, plene reviziita historio pri la atakoj kontraŭ la E-movado, precipe sub Hitler kaj Stalin, sed ankaŭ en la cara Ruslando kaj la orienta Azio.
Rotterdam, UEA, 2016. 375+24 paĝoj, 19 cm. Prezo ĉe UEA: 18,00 €

## La somera programo de NASK 2021 estas malfermita por aliĝo. Ne hezitu – Aliĝu nun!

Informado estas trovebla ĉe:
https://www.esperantic.org/eo/2021-1-2/
https://www.esperantic.org/en/nask-2021-1-1/

Atentu, ke la datoj kaj horoj estas malsamaj por la Postbaza kurso, kaj la Meznivela kaj Supera kursoj:

La Postbaza kurso estas du-semajna, de lundo ĝis vendredo, 17:30-19:00 laŭ la usona orienta horzono (Novjorko). La datoj estas 5-9 kaj 12-16 julio, 2021.




La Meznivela kaj Supera kursoj estas semajnfinaj, 31 julio-1 aŭgusto kaj 7-8 aŭgusto, 11:00-13:00 kaj 14:00-16:00 laŭ la usona orienta horzono, kaj sabaton kaj dimanĉon por la du semajnfinoj.

La kosto estas US$ 79.00, kaj stipendia helpo estas havebla laŭ peto. Oni povas ricevi US$ 50.00 por la Postbaza kurso, kaj 50% de la kosto por la Meznivela kaj Supera kursoj.

UEA gratulas siajn partnerojn pro unu plia okazigo de NASK kaj bondeziras al ĉiuj instruistoj kaj kursanoj!




**Eventa Servo** estas retejo per kiu oni povas registri, listigi kaj diskonigi eventojn tutmonde.

# INK-konkurso

INK (Internacia Novelo-Konkurso) en sia kvara kaj lasta sabata babilado ekkonis la verkojn de Spomenka Štimec. La 12-an de junio okazis renkontiĝo en la jutuba kanalo de UEA, kie vi povas aŭskulti konversacion kun la verkisto Spomenka Štimec kaj la eldonisto de ŝiaj verkoj Brunetto Casini (la eldonejo nomiĝas *Edistudio*).

La babiladon gvidis: Nicola Ruggiero.

Vi povas spekti la elsendon en la jutuba kanalo de UEA: https://www.youtube.com/user/UEAviva.

Vi ankaŭ povas partopreni la konkurson. Aliĝu: https://www.akademio-literatura.org/ink.



Foto: So Jinsu

# Alvoko por virtualaj ekskursoj, kontribuoj al la Faka Forumo kaj Movada Foiro

Kiel pasintjare, ankaŭ dum la VK-2 okazos virtualaj ekskursoj. Se vi ŝatus mem proponi tian ekskurson pri via lando aŭ urbo, bv. kontakti *amriwandel@gmail.com*. Vidu klarigon en VK-1: https://mallonge.net/ef.

Ankaŭ okazos Faka Forumo (FF) – kunveno de Fakaj Asocioj dum kiu Fakaj Asocioj povas koncize prezenti sian agadon kaj iniciatojn. Efektive ĝi estos jam la tria tiuspeca reta forumo (FF1 kiel dirite dum VK-1, jutuba registraĵo: https://mallonge.net/9v, FF2 en marto, jutuba registraĵo: https://mallonge.net/cw. Ĉar FF3 daŭros nur unu horon, la kontribuoj estos limigitaj, kaj estas necese anticipe sin anonci ĉe *amriwandel@gmail.com*. Okazon por pli longa sinprezento kadre de VK-2 provizas la Movada Foiro, kiu simile al VK-1 okazos rande de la kerna programo, inter 10-12h kaj 18-20h UTC. Por rezervi unu-horan blokon bv. kontakti *anna.lowenstein@esperanto.org*.

# SES-2021 – nur virtuale (fizika SES en Ĉeĥio en 2022)

Bedaŭrinde SES-2021 ne okazos ĉi-jare fizike en Ĉeĥio – kiel antaŭe estis planite. Sed aliflanke – kun ĝojo ni informas vin, ke ĝi tamen ja okazos – virtuale kaj tutmonde!




La pandemiaj obstakloj ne permesas, ke SES-2021 okazu kiel kutime, tial oni preparas por vi specialan, unikan virtualan Esperanto-lernejon! Duan fojon do vi havos la ŝancon lerni Esperanton dum SES kaj samtempe resti hejme!



Tiu ĉi SES okazos de la 2-a ĝis 11-a de julio 2021, kaj la ĉefa instruado okazos dum la du semajnfinoj (kun aldona libervola programo inter ili – lunde-vendrede).

Pliaj informoj kaj la aliĝilo ĉe: https://ses.ikso.net.




**La 21-a Israela Kongreso Tel-Avivo 7-9.10.2021** denove **ĈEESTE**! Ekskursoj (Jafo. Marbordo), prelegoj, koncertoj kaj teatraĵoj (Bronŝtejn, Handzlik kaj Pilipović kp). Programo http://esperanto.org.il/ik.html). **Aliĝu ĉe eli@esperanto.org.il**.

Du noktoj en dulita ĉambro inkl. maten+vespermanĝojn por persono po **185 €**.
Antaŭpago 50 €, ĝis 8.8.21 garantiita loko en la kongresa gastejo. **Nuligo**: ĝis 8.8.2021 senpaga. Ĝis 23.9.2021 – 50 €. Poste plena kotizo.

**Ekskursoj: 1-5.10.21** Jerusalemo, Morta Maro, Eilat, Petra, Wadi Rum – 600 €. **5-7.10.21** – Haifa, Akko, Nazareto, Lago de Galileo – 300 €. Profesia ĉiĉeronado en Esperanto.